

Kluba Bulteno

Organo de Klubo Esperantista en Oslo

N-ro 4 2016 Merkredon la 16an de novembro 64a jaro

Kalendaro

Ĉiuj vesperaj kunvenoj komenciĝos je la **18a 30.**

Sabato la 19 a de novembro (semajno 46) – *lördag*

Seminario de NEL. Vd. la trian paĝon *se 3. side*. Se vi mem ne havas skajpon, vi bonvenos partopreni en la klubejo, sed bv. antaŭanonci vin.

Lundo la 21a de novembro (semajno 47) – *mandag*

Ni prezentas la kurson (filmon) *Pasporto al la tuta mondo*, filmitan en Usono en 2002, kun aktoroj el multaj landoj. Amuza kaj instrua. Taŭgas por ĉiuj komencintoj. Ni montros ekrane partojn de la unuaj lecionojn.

Vi viser kurset (filmen) "Pasporto al la tuta mondo" (Pass til hele verden). Spilt inn i USA i 2002, med skuespillere fra mange land. Morsom og pedagogisk. Passer for alle som har et lite grunnlag. Vi viser deler av de første leksjonene på skjerm.

Mardo la 6a de decembro (sem. 49) – *tirsdag*

Tradukekzerco. (Daŭrigo de la laboro 5. majo.) Ni traktos malnetan tradukon pri tradiciaj metioj, diskutante malfacilajn esprimojn..

Oversettelsesoppgave. (Fortsettelse av arbeidet 5. mai.) Vi bearbeider et utkast om "små håndverksfag", og diskuterer vanskelige uttrykk.

Lundo la 19a de decembro (sem. 51) – *mandag*

Literatura kunveno. Ĉiuj prezentu iun Esperantan libron. (Aŭ nur venu aŭskulti.)

Litteraturmøte. Alle velger en Esperanto-bok og forteller om den (eller bare hører på de andre).

Mardo la 3a de januaro (semajno 1) – *tirsdag*

Esperoj kaj perspektivoj por Esperanto en 2017.

Hvilke håp og perspektiver ser vi for esperanto i 2017?

OKAZIS

Vizito de NEL-prezidanto (22.8)

La prezidanto de NEL, Mario Machlik, loĝas en Tromsø, sed venis al Oslo pro familia vizito, kaj ankaŭ al nia klubejo. Ni kunvenis kelkope, trarigardis la ejon kaj interŝanĝis novaĵojn pri NEL-aferoj, precipe pri la ebloj ekzameniĝi pri Esperanto ĉi-lande.

Universala Kongreso (6.9)

La Universala Kongreso en Nitro: Niaj du raportantoj ambaŭ havis praktikajn problemojn pri transporto al kaj dum la kongreso. Sed la kongresa programo mem estis bunta kaj riĉa, kiel ĉiam, kun samtempaj prelegoj kaj diversaj muzikaj prezentoj. Nova ĉi-jare estis manifestacio en la ĉefstrato por vidigi Esperanton al la urba publiko.

Baladoj kaj ĉen-dancoj (16.9)

Kromkunveno kun Martin Strid el Svedio. Li montris per filmetoj kiel feroanoj amase ĉen-dancas kantante baladojn el la mezepoko, kaj fine ni ankaŭ kundancis unu baladon kiun li tradukis al Esperanto. Li lasis kajeron kun 25 longaj baladoj kiujn li esperantigis kaj unu (*Valdemara balado*, pri Valdemar Langlet) kiun li mem verkis.

Kiel informi neni-sciantojn (19.9)

Ni diskutis kiujn informojn unue doni al homoj kiuj scias nenion pri Esperanto, kaj aliredaktis aktualan

flugfolieton, i.a. forŝovante ĝis la fino la informon pri la lanĉo en 1887 en Varsovio.

Malnovaj metioj – tradukado (4.10)

La malneta traduko kiun Kjell Peder faris de la kajero pri malnovaj metioj, aspektis iel akceptebla, malgraŭ kelkaj misskriboj kaj evidentaj gramatikaj eraroj. Tamen tiom da saĝaj stilaj plibonigoj povis proponi nia hejma-akademiano Otto, ke la tuta kunveno ne sufiĉis por trakti pli ol la enkondukon sur la unua paĝo.

Kiel aperigi artikolon? (17.10)

Por sukcesi aperigi artikolon (kronikon, leteron de leganto, intervjuon) en gazeto, ni konstatis kelkajn bazajn konsilojn:

- skribu ne tion, kio interesas *nin*, sed kio interesas la legantojn;
- konatiĝu kun la stilo de la koncerna gazeto aŭ rubriko;
- aludu al jam aktualaj eventoj aŭ diskuttemoj;
- kaj en novaĵ-artikolo la ĉefa informo venu ĉe la komenco.

Informkunveno sen novuloj (31.10)

Ni invitis – per lernu.net, hieraŭa informbudo kaj najbaraj retroŝtaj adresoj – al informkunveno, sed tiuj invitoj ne funkciis laŭtende kaj sekve ne venis novuloj. Do ni informis unu al la aliaj pri tio, kiel prezenti la lingvon kaj ties bonajn trajtojn. [pli sur p. 3, malsupre

Seminario de NEL * **sabaton 19an de novembro, 14a – 17a h.**

Ni memorigas ke ĉi-jare anstataŭ landan kongreson NEL aranĝas seminarion per skajpo (senpaga perreta telefono). Vidu *Norvega Esperantisto* 5, p. 5.

Enkondukos la renoma germana spertulo pri amaskomunikila informado, Lu Wunsch-Rolshoven. "Publike informi pri la Esperanto-komunumo".

Eblos partopreni en Esperantonia (Sinsen), sed bv antaŭanonci vin, ĉar se venos pli ol du, ni devos transloki la komputilon (kaj la multajn konduktilojn) el la oficejo malsupren al la kunvenĉambro.

*NEL = Norvega Esperantista Ligo

Bibliotekaj libroj aĉeteblaj

[Jam dissendita per NEL-inform]

En nia librokolekto en Esperantonia ni havas pli ol unu ekzempleron de multaj libroj. La kromekzemplerojn ni nun ofertas al la membroj de NEL por po 20 kr + ev. afranko. Maldikajn kajerojn (< 50 p.) po 5 kr.

Ligilojn al tri listoj vi trovos interrete ĉe

<oficejo@esperanto.no>eranto.no → (supre) MOVADO → Biblioteko (malsupre en la paĝo).

En la listoj:

Se en la kolumno "kromekz." staras nenio, ni havas unu kromekzempleron. "ne NB" indikas ke la libro ne estas registrita en la Nacia Biblioteko kaj ni konservas unu ekz. por iama sendo tien.

bd = malmole bindita

Demandojn aŭ mendojn vi povas sendi al oficejo@esperanto.no

OKAZIS (daŭrigo de la dua paĝo)

Membroj vojaĝegos (1.11)

Ankaŭ al la dua informkunveno venis neniu novulo, sed jes kelkaj membroj kiujn ni ne ofte vidas. Ni aŭdis pri planataj vojaĝoj al Tanzanio kaj Filipinoj kaj iom pri la sociaj kondiĉoj en tiuj landoj.

Ĉu iu volas lui kunvenĉambron? – leie møterom?

Nia kunveno estas ofte neuzata, sed taŭgus por kunvenoj de malgrandaj grupoj aŭ – post rearanĝo de la mebloj – ĝis ĉ 20 homoj. Ekz-e por loka sekcio de tutlanda organizo. Alloga povas esti la rekta eniro el la strato. Ĉu vi konas iujn kiuj bezonas kunvenejon?

Kjenner du noen som kunne være interessert i å leie møterommet vårt for én eller flere kvelder? Eller en helg? Vi trenger leieinntekter! Brosjyre med nærmere opplysninger og bilder kan du få fra kontoret.

Kromekzempleroj

En la klubejo ni havas grandan kolekton da **kromekzempleroj de internaciaj periodaĵoj**: *Heroldo, Sennaciulo, Literatura Foiro, Kontakto* k.a. Senpage preneblaj!

Vizitkartoj Ankoraŭ restas vizitkartoj kun la adresoj i.a. de la senpagaj E-retkursoj lernu.net kaj (la angla) duolingo.com.

Ni funebras

Mortis Kari Kalsås, Røa, 88-jara. Ŝi estis rajtigita turisma ĉiĉerono en Esperanto, membro de 1955. Memorvortojn sendis Nordstrandanoj:

Kari, nia tre fidela, varma kaj vera amikino forpasis la 25an de oktobro. Ni ofte kongresis kaj havis tre interesajn kaj agrablajn tempojn kune kun ŝi. Ŝi ĉiam estis nia sunradio kaj estis tre sek-sprita. Ni multe ridis.

Ni ankaŭ kantis kune en eta ĥoro, kantante en hejmoj de maljunuloj, donante al ili agrablan tempon. Kaj Kari ĉiam estis tre ĉarma kaj vigla.

Ni sentos la mankon de Kari. Pacon al ŝia memoro.

Astrid, Bibbi, Ellenfanten.

Klubo Esperantista en Oslo, Olaf Schous vei 18*, 0572 Oslo. Tlf. 22 35 08 94

Tramo 17 al Sinsenterrassen aŭ buso 31 al Rosenhoff aŭ metroo 5 aŭ 4 al Sinsen. Vd. pli detale interrete ĉe esperanto.no/oslo => "vojklarigo".

* inng. Schouterassen. www.esperanto.no/oslo Retpoŝto: [oficejo\[a\]esperanto.no](mailto:oficejo[a]esperanto.no) Bankkonto 0532 36 19699 (sed kotizon pagu al NEL/*Forbundet* 0533 05 22870).